

BONA ESPERO



ISSN:0006-7024

Volume 1994/31 - Numero 1

Bona Espero

Organo de la Esperanto-Asocio de Suda Afriko (EASA)

Kontribua ojn, prefere sur komputora diskedo (en formato WP 5.1) aŭ maŝinskribitajn oni sendu al la redaktoro:

Harro von Blotnitz
17 Irwell Str
OBSERVATORY
7925

La personoj kies nomoj aperas kun kontribua oj respondecas pri ili kaj ilia enhavo. Represo de artikoloj estas permesata, sed bonvolu indiki la fonton.

La revuo aperas trifoje en jaro kaj iras senpage al membroj de la Asocio. Interŝanĝe por aliaj revuoj, ĝi estas havebla de la kasisto. Nemembroj povas aboni, skribante rekte al la kasisto:

s-ro C Beckford
Poŝtfako 1227
CAPE TOWN
8000

Esperanto-Asocio de Suda Afriko

Ĝenerala adreso de la asocio:

s-ro O Sher
Bronkhorststrato 75
Groenkloof
PRETORIO
0181

Prezidanto: J Cloete
Vic-Prezidanto: H von Blotnitz
Sekretario: O Sher
Kasisto: C Beckford
Aliaj komitatanoj: H Appel, A Fouché, E de Kock, J Hammes,
F Woolf, J Spoelstra.

ENHAVO

El la redaktejo	2
Donaco de s-ro Otto Müller	2
English or Esperanto?	3
Penseto pri la delegitoj	5
Financa raporto	6
Anoncoj kaj Nova oj	7
- Nekrologo: D-ro R.M. Schweitzer	7
- Vizitinto: D-ro Petro Denke	7
- Skoltoj: Re prezentanto bezonata	7
- Afrikansa lernolibro preskaŭ preta	7
- Simon Donnelly reveninta	7
Instruisto serĉata!	8
Some Hints on Grammar and Syntax - II	9
La faklingvo en Esperanto	10
Vojaĝo al Usono	11
Bahasa Indonesia (in English)	15
Deziras korespondi	17

La kovrilo: Ĉu iam leviĝas super Tablomonto la stelo de Esperanto kiam ĉe ĝia piedo kunvenas la Esperantista mondo por Universala Kongreso? Legu pri tiaj ideoj en la venonta numero, kio ankaŭ estos la lasta redaktota de Harro von Blottnitz.

Pardonpeto: La antaŭa numero (aperinte en decembro 1993) ne estis numero 3, sed numero 2 por 1993. La redaktoro pardonpetas.

El la redakatejo ...

Saluton denove, karaj gelegantoj! Vi havas antaŭ vi la unuan numeron de *Bona Espero* por 1994.


Mi volas ĉi-foje uzi ĉi-tiun rubrikon por skribi pri la aperritmo kaj -ofteco de Bona Espero. Oficiale ĝi devus aperi tri fojojn jare. Pri la enhavo, formato kaj datoj de apero ne ekzistas preskribo. Decidas la redaktoro.

Tamen ne estas sekreto, ke pasintjare aperis nur du numeroj (kvankam la dua erare nombriĝis numero tri). Ne ke la redakatejo dronis en protestaj leteroj aŭ alvokoj! Kutime venas nur unu, eble du protestoj. Tio estas malkvietiga kaj kuraĝigas la redaktoron daŭrigi la nunan aperritmon!

Aliflanke oni ne forgesu, ke la redaktoro estas studento okupata pri scienca esplorado: tio signifas, ke li ne havas 8-horan labortagon: li laboras ĝis li laciĝas, poste li restas, dormas aŭ ferias. En tiu tempo de ripozo kreiĝas *Bona Espero*.

Mi esperas, ke *Bona Espero* denove plaĉas al vi. Ne forgesu, ke por la venonta numero ĝi bezonas artikolojn kaj leterojn de la legantoj.

Amike via,



DANKON !

Dum kelkaj monatoj lastjare s-ro Otto Müller el Munkeno, Germanio, feris en Pretorio. Li aĉetis brokantan aŭton kaj traveturis la landon. Ni esperas, ke en posta numero aperos artikolo pri lia ferio kaj rondvojaĝado. Kiam li devis hejmeniri, li donacis la aŭton al la Esperanto-Asocio de Suda Afriko. Ni vendis ĝin por R4000. La monon ni volas uzi por eldoni la afrikansan lernolibron. Ni elkore dankas s-ron Müller por lia malavara donaco.

KONDOLENCOJN ...

ni esprimas al nia sekretario, s-ro Oskaro Sher, kaj al lia familio. Lia patrino forpasis la 12-an de junio. Ŝi estis konata al ĉiuj komitatanoj kaj gastoj kiuj iam partoprenis kunvenon en la hejmo Sher.

ENGLISH or ESPERANTO?

The recent political changes in South Africa and, in particular, the introduction of 11 official languages in the new constitution have, once again, brought the language question to the public's attention. It seems that most South Africans expect English to take a dominant role, both in the regions and nationally, as well as in international relations. A corresponding investment into the teaching, studying and learning of English can, therefore, be expected.

Whilst some of the more successful students can expect rewards in the form of white-collar employment or increased business opportunity, there are some lessons to be learnt from other country's experiences. In particular, an increased use of English will tend to entrench the dominant position of the english-speaking section of the population. The following article by Professor J.C. Wells explains the underlying reasons.

Professor Wells is the Head of the Department of Phonetics and Linguistics at the University College London. Currently, he is also the president of the Universal Esperanto Association.

English or Esperanto?

1. The problem. The advantage of adopting a single common language for communication across national and linguistic frontiers must be obvious to all. No-one can master all the nine official languages of the European Community (Danish, Dutch, English, French, German, Greek, Italian, Portuguese, Spanish), let alone the many further languages which may be added in the years to come (Icelandic, Norwegian, Swedish; Croatian, Czech, Estonian, Finnish, Hungarian, Latvian, Lithuanian, Polish, Slovak, Slovenian, Turkish?). On a world scale, we must reckon with some fifty standardized literary languages and well over 3000 languages in all. What language are we to use in order to do business with the Arabs? the Chinese? the Japanese? We need a common second language which all can learn and use alongside their own native language.

2. English. At present the world is on the whole trying to solve this problem by choosing English. The view has been increasingly widely held during the last half-century that English is destined to be the international language, which everyone must learn to use. Since the end of the second world war, in fact, English has been taught in the schools throughout western Europe and indeed throughout most of the world. We now have a generation of young and middle-aged adults who learned English at school and who therefore ought to be able to use it for international communication. To some extent, they can: many people have learnt enough of English as a Foreign Language (EFL) to exchange very basic information.

Unfortunately, very basic information is often all they are capable of exchanging. For more sophisticated or subtle matters, whether in speech or writing, their knowledge often proves

insufficient. This is often the case even for those who have spent years of their life working hard at language study. Some may find they can read written English and understand spoken English, but not feel able to write or speak freely themselves. Faced with the ordinary speech of English people, or Americans, or other native speakers, they cannot follow; they certainly cannot participate freely in a conversation or negotiate as equals. Market research by the advertising agency Lintas:Paris (1989) showed that a simple English test sentence was correctly understood by fewer than half of a representative sample of the adult population in the Netherlands, fewer than a third in (western) Germany, and less than one-tenth in France, Spain, and Italy.

In Italy, in fact, only 4% interpreted the sentence correctly; even among those under 25, only 7% got the right answer. The conclusion is that after years of teaching English the Italians, at least, have failed to solve the language problem.

Among reasons why English is unsuccessful must be that it is difficult to learn. Its phonetics offer great problems to many learners. Its orthography is notoriously inconsistent. Its morphology may be relatively straightforward, but its syntax is remarkably intricate once the learner moves beyond very simple constructions. Its vocabulary is indeed rich (that is, large); but with richness comes the difficulty for the learner of committing to memory all the subtle distinctions of meaning between near-synonyms. Its phrasal verbs offer many traps for the learner (eg. "to put up" meaning "to accommodate"). In the verbal system there is a tricky set of aspectual distinctions, a rich source of errors in EFL (eg. the difference between "Where do you live?" and "Where are you living?") Many of its grammatical words, vital for understanding nuances of tense and aspect, appear in connected speech as "weak forms", so reduced phonetically that they are just not heard by most speakers of EFL; the EFL speakers themselves, by not using these weak forms when they speak, give native English listeners the false impression that they are emphasizing the words in question. English word stress is variable and only in a very limited degree predictable. English intonation is much more complicated than that of most languages.

There are also external reasons why English is an unacceptable choice for the role of international common language. It is unfair: using English gives an unfair advantage to those who happen to be native speakers (in Europe, the British and Irish; on a world scale, the Americans, the Australians, and others too). It is seen by many as threatening to lead to the swamping of the world's mosaic of indigenous cultural patterns by an all-engulfing American Coca-Cola Disneyland juggernaut.

3. Esperanto. The users of Esperanto have demonstrated that there is another way. Being a constructed language, based on European roots but massively standardized, Esperanto is much easier to learn than ethnic languages. A century of practical use in many different countries means that it is a well-proved living, functional language, not some armchair

project. (It is not widely appreciated that Esperanto is an actual language, in which hundreds of thousands of people can and do speak to one another: some meet, marry, and raise families in it.)

Esperanto represents a fair solution to the problem. It belongs to no particular national or ethnic group - it belongs to everyone equally. It gives no linguistic group a unique advantage over the rest. It is surely fairer that ten-tenths of mankind should learn an easy language, rather than that nine-tenths should have to learn a difficult language, which the remaining one-tenth, through the accident of their birth, already know.

4. Conclusion. To advocate Esperanto means to advocate a radical rethink of our attitude to the world language problem. The power of the status quo is strong - the political, economic, and social factors that favour the continued use of English. Nevertheless, I would claim that the long-term arguments in favour of adopting Esperanto are stronger: it represents a more equitable and more efficient solution to the world language problem.

In South Africa there are currently no reasons to propose an immediate introduction of Esperanto for general use. In this matter, the country can only follow the rest of the world. However, a large amount of pioneering work still needs to be done to ensure that should the world community adopt Esperanto some day, South Africa is not caught napping. This work incorporates the compilation of dictionaries and the development of courses and syllabi in each of the national languages. There is thus good reason to learn Esperanto even now. On the personal side, the contacts with an international community, which of late also includes pioneers in many African countries, can be a very rewarding experience.

----!@#\$%^&**&^%\$#@!----

Penseto pri la delegitoj

Ekrigardo en la jarlibron de UEA por 1994 montras truon en la sudafrika mapo, almenaŭ laŭ la kovrado de ĝi per la delegita reto. Ni nun havas naŭ memstarajn regionojn: delegitoj troviĝas nur en kvar el ili (Okcident-Kabo 2, PWV 3, Orient-Transvalo 1 kaj Nord-Okcidento 1). Ankaŭ laŭ fakoj ni ne donas al la movadanoj en la cetera mondo nian tutan kapablon!

EASA membroj, kiuj pripensas la ideon delegitiĝi, skribu bv. al nia ĉefdelegito, s-ro C. Beckford (adreso apud p. 1).

FINANCA RAPORTO

ESPERANTO-ASOCIO DE SUDA AFRIKO

FINANCA RAPORTO POR LA JARO 1993

		1992
ENSPEZOJ		----- R
Kotizoj	240.00	180
Korespondkurso	33.16	39
Rentumo enspezita	876.82	951
Donacoj	4,015.00	4
	-----	-----
	5,164.98	1,174
	-----	-----
ELSPEZOJ		
Afranko	38.55	45
Bona Espero	456.45	521
Filiiga pago al UEA	134.50	132
Paperaĵoj	37.19	90
	-----	-----
	666.69	788
	-----	-----
Gajno	4,498.29	386
	-----	-----

BILANCO JE 31 DECEMBRO 1993

		1992
PASIVOJ		----- R
Profitoj de antaŭaj jaroj	6,178.24	5,792
Gajno dum kuranta jaro	4,498.29	386
	-----	-----
Kapitalo	10,676.53	6,178
Dumvivaj kotizoj	1,655.50	1,505
Ŝuldo al Kasisto	24.50	76
Ŝuldo al Sekretario	0.00	24
Antaŭricevitaj enspezoj	91.00	86
	-----	-----
	12,447.53	7,869
	-----	-----
AKTIVOJ		
Eskom obligacioj	2,316.21	2,316
Syfret's fiksdato depono	4,760.91	4,059
Nedbank - ŝparkonto	5,063.26	1,063
Rento ŝuldata	26.67	27
	-----	-----
	12,167.05	7,465
Stoko de libroj	254.48	334
Stoko de paperaĵoj	26.00	70
	-----	-----
	12,447.53	7,869
	-----	-----

C S Beckford

C S Beckford (Kasisto)

Membronombro 53

Anoncoj kaj Novaĵoj

Nekrologo

Mortis la 28-an de majo 1994, D-ro R M Schweitzer, membro de EASA de 1963 ĝis 1988. Li loĝis en East London sed posedis kelkajn domojn en Cape Town kaj mi ofte renkontiĝis kun li kiam li vizitis parencojn en tiu urbo. Kun ĝojo mi memoras la multajn promenadojn kiujn ni kune faris kaj la grimpadon de Lion's Head.

Colin Beckford

Vizitinto: D-ro Petro Denke

Dum marto kaj aprilo vizitis nian landon d-ro Petro Denke, kuracisto el Törökbálint, Hungario. Li vizitis esperantistojn en Johannesburgo, Pretorio, Durban, Port-Elizabeth kaj Kaburbo, veturante per aŭtobuso inter la urboj. En posta letero li skribis, ke la vizito al nia "landego" estas "neforgesebla". Lia entuziasmo kaj intereso restas ankaŭ ĉi-tie neforgesataj.

Esperantistoj, kiuj ŝatus gastigi vizitontojn anoncu sin ĉe la Pasporta Servo (detaloj de la ĉefdelegito).

Skoltoj: Reprezentanto bezonata

Skolta Esperanto Ligo (S.E.L.) serĉas nacian reprezentanton aŭ peranton por Sudafriko. Ĉu iu esperantisto en Sudafriko apartenas al aŭ almenaŭ interesiĝas pri la aktivecoj de skolta grupo? Bv. skribi al s-ro H. W. Appel, T59 Eddy House, 133 Ampthill Ave, 1501 Benoni.

Afrikansa lernolibro preskaŭ preta

Kiel jam raportite en la antaŭa numero aperos baldaŭ lernolibro de la Internacia Lingvo en la afrikansa. Oni nuntempe elektas presiston. La libroj (\pm 80-paĝa en A5-formato) kostos verŝajne po inter R12 kaj R15. Personoj, kiuj volas mendi grandajn kvantojn je pli malalta prezo urĝe kontaktu la sekretarion.

Simon Donnelly reveninta

Post preskaŭ kvar jaroj en Usono, Simon Donnelly (konata inter sudafrikaj esperantistoj de la tempo de la Esperanto Klubo Surmonteta) revenis komence de julio. Post kelksemajna ferio kun lia familio en Kaburbo, li iros al Sterkspruit en la Transkejo por studi dum unu jaro la lingvon de la Phuti tribo. Post tio li reiros al Usono por fini sian disertaĵon.

Ni deziras al Simon sukceson por la studadoj kaj feliĉan tempon en la nova Sudafriko.

Instruisto serĉata!

En la antaŭa numero de *Bona Espero* aperis artikolo pri la "Esperanto Aĉetcentro" en Rietpan apud Benoni (p.3). En ĝi estis menciite, ke s-ro Chassoulas pretus subteni instruiston de la Internacia Lingvo per loĝloko kaj financaj rimedoj.

Sinanoncoj

de sudafrikaj esperantistoj aŭ instruistoj estas

petataj

por la posteno. Bona kono de la lingvo helpus. Komencantoj rajtas kandidatiĝi se pretaj sekvi kurson por 6 monatoj antaŭ ekinstruado. La sinanoncojn oni sendu al la sekretario (adreso apud paĝo 1)

antaŭ la 15-a de septembro 1994.

En la maja numero de *Esperanto* aperis la sama artikolo. Sekve, nia sekretario ricevis leterojn de interesatoj el Alĝerio, Rusujo, Ukrainio, Ĉeĥio, Kolombio, Madagaskaro, Ĉinio kaj eĉ telefon Alvokon el Siberio. Se neniuj sudafrikanoj interesiĝus, la komitato serioze pripensos la eblecon doni la postenon al eksterlandano.

Devoj:

La sukcesa kandidato instruos Esperanton al komencantoj, aparte lernantoj en lokaj lernejoj, kiujn li/ŝi mem - kun subteno de lokaj esperantistoj - varbos.

La oferto ...

konsistas el loĝloko (sufiĉe granda por familio, se necese) en la aĉetcentro. Pago por la tasko estas diskutbla, sed la sukcesa kandidato devus havi kroman enspezmendon. La oferto estas renovigenda post jaro.

Lingvo...Lingvo...Lingvo...Lingvo...Lingvo...Lingvo...Lingvo..Lingvo..Lingvo..Lingvo..

In the previous volume we published the first of two articles containing some useful guides for writing in Esperanto. The author considers the notes sufficiently important to be a constant companion, always at hand. Here then,

Some Hints on Grammar and Syntax - II

by F.M. Woolf

7. For conciseness, emphasis or perhaps consideration of space and in telegrams a **CLAUSE** related to the main clause can very often be rendered **IN ONE WORD** by converting its verb to a participle, active or passive, with the adverbial ending: After he had finished singing, the actor left the stage - **Kantinte**, la aktoro forlasis la scenejon; When it was about to be washed, the dog disappeared - **Lavote**, la hundo malaperis; One likes to be seated while one eats - **Mangante**, oni preferas sidi. So also, phrases beginning with **AS**, **LIKE**, **IN** or **WITH** followed by a noun may be rendered adverbially: **AS** a friend - **amike**; **LIKE** a father - **patre**; **IN** the evening - **vespere**; **WITH** a smile - **ridete**.

8. As **A PHRASE CONTAINING AN UNRELATED PARTICIPLE IS NOT USED IN ESPERANTO** (the Latin "ablative absolute"), a subordinate clause or other form is used instead: "The wine being drunk, I went home" cannot be "La vino trinkite mi iris hejmen", as it refers to the subject "mi"! Rather: Trinkinte la vinon ... Her husband having died, she sold the house - Ĉar (or pro tio, ke or post kiam) ŝia edzo mortis ...

9. There is a fine difference between **MULTAJ** and **MULTE DA**, and **KELKAJ** and **KELKE DA**. **Multaj** homoj denotes many people scattered all over the place, anywhere, everywhere, while **Multe da** homoj signifies a concentration in one place at the time referred to. The same applies to **KELKAJ** and **KELKE DA**. These usages are, however, flexible as in: I had a few guests - mi havis **kelkajn** gastojn.

10. In **SUPERLATIVES** such as the second-largest bridge, the fourth-largest city, add **-loke** to the numeral or turn the numeral into an **ADVERB**: La **dualoke** plej longa ponto; la **kvare** plej granda urbo.

11. Note the following: The details are too clear **FOR ME TO GO WRONG** (so clear that I cannot ...) - la detaloj estas tro klaraj **ol ke mi eraru**, or, ... tiel klaraj **ke mi ne povus erari**; they were **TOO BUSY TO BE INTERESTED** - ... tiel okupitaj, **ke ili ne povis interesigi**.

Lingvo...Lingvo...Lingvo...Lingvo...Lingvo...Lingvo...Lingvo..Lingvo..Lingvo..Lingvo..

Lingvo...Lingvo...Lingvo...Lingvo...Lingvo...Lingvo...Lingvo..Lingvo..Lingvo..Lingvo..

12. To convey FEW IN EXCESS OF a certain number, add **kelkaj** to the number: Just over 20 people were present - **ĉeestis dudekkelkaj** homoj; I have over 10 books on that subject - mi havas **dekkelkajn** librojn pri tiu temo. A teenager is **dekkelkjarulo**.

Recenzo:

La faklingvo en Esperanto

(Artikolo de d-ro Werner Bormann)

En n-ro 26 de *La letero de l' Akademio de Esperanto* aperas sur paĝoj 3-5 artikolo pri la faka esprimkapablo en Esperanto. La verkisto, ankaŭ konata en Sudafriko, unue prelege prezentis la enhavon; la okazo estis la 78-a Brita Kongreso en Richmond (2-a de aprilo 1994).

Enkonduke estas prezentataj sciindaj faktoj pri vortkvantoj de la moderno: "La plej granda vortaro pri la Germana kaj la Angla enhavas 220 000 Anglajn kapvortojn kun 500 000 Germanaj tradukoj kaj en dua volumo 340 000 Germanajn kapvortojn kun 600 000 Anglaj tradukoj. En la Plena Ilustrita Vortaro estas 15 250 kapvortoj, el kiuj facile fareblas 150 000 vortoj aŭ eĉ pli; la plej nova Esperanto-vortaro en la Germana havas 40 000 vortojn." Plue, "la tradukhelpo de la Eŭropa Komunumo registris po 500 000 elementojn en la Angla kaj en la Franca".

La aŭtoro montras, ke multon jam eblas fari en Esperanto sen sufero pro manko de terminoj. Tamen ekzistas kvantoproblemo kaj multe da laboro estas necesa por plibonigi la ŝancojn de Esperanto.

La rekomendoj estas, ke je la unua flanko Esperantistoj lingve konduku kiel "Usonanoj, Britoj kaj aliaj Anglalingvanoj" [tio signifas, ke oni uzu Esperantajn, ne Esperantigitajn vortojn]; je la alia flanko estas bezonata organiza o kiu registrus la ekzaktajn signifojn de la novaj terminoj.

La artikolo estas legenda por ĉiuj Esperantistoj kiuj pridemandas la fakan esprimkapablon en Esperanto. La lingvo havas la kapablon - la demando estas, ĉu la Esperantistoj ĝin havas.

Lingvo...Lingvo...Lingvo...Lingvo...Lingvo...Lingvo...Lingvo..Lingvo..Lingvo..Lingvo..

Vojaĝo al Usono

(E. de Kock)

La 29an de Marto mi kaj Ria alvenis ĉi tie en Usono per Aeroflot. Se mi diras: "Ni flugis de Johanesburgo al San Francisko trans la nordan poluson, voje de Alasko," la alparolato eble opinias, ke elfalis iuj ŝraŭboj el mia kapo; sed tiel ja estis.

Ni nome iris unue al Malto, alvenate la 13an de Februaro, kie ni pasigis pli ol monaton ĝis la 29a de Marto - hirundoj atendantaj forsolvigon de la norda vintro, por kiel eble plej eviti froston kaj precipe neĝon, kiun ni sunuloj ne ŝatas aparte. Tiam ni vojis pluen, al Moskvo, kie nestas la fluglinio Aeroflot, kies pasaĝeroj ni estis. Nin tamen atendis blanka tero, ĉar tie dume pludaŭris la vintro. La 29an de Marto, ni finis nian odiseon, kiu inkluzivis surteriĝon en Anchorage, Alasko. Do tio pri la raŭto el Sud-Afriko al Usono trans la nordan poluson ne estis blago aŭ ebria songo, sed stranga vera o, pro la formo de la tero.

La unua alvenpunkto estis Malto, landeto pli suda ol la plej nordaj eroj de Afriko. "Ĝi estas parto de Eŭropo," insistis al mi tieulo, "kiel ankaŭ Tunizio kaj Alĝerio". Ĉi lasta informero vekis ĉe mi iom da skeptiko, kiun mi tamen ne envortigis. Kvankam tiuinsule oficialas ankaŭ la Angla, oni pleje parolas la Maltan, lingvon parenkan al la Araba, kiun importis la Saracenoj, regintaj tie antaŭ kaj dum jarcentoj. Ja enestas ankaŭ multaj vortoj pruntitaj, precipe el la Itala.

Sed nuntempe la homoj estas ne Islamoj sed Kristanoj, ĉefe Rom-Katolikaj. Krome la aŭtojn oni stiras maldekstraflanke, kiel en Britujo kaj Sud-Afriko. Tio, lige al la oficialeco de la Angla, konsistigas signon pri iama aparteno al certa Imperio. Malto eble estas la plej dense loĝata lando, kvankam ne regiono, de la mondo - kun proksimume 340 000 homoj sur insuleto ne pli granda ol Pretorio kun iuj apudaj lokoj. Ŝajnis kvazaŭ ĉiu havus du aŭ tri aŭtomobilojn. Eĉ transmarŝi straton povas esti riska aventuro, kvankam la homoj ĝenerale scias eviti la likvidon de turistoj; grava enspezrimedo. La lando estas meze bonstata.

Plej fascinaj el la antikvaj restaĵoj estas diversaj temploj megalitaj, el epoko antaŭ kvar jarmiloj. Laŭ la Maltanoj tiu tuta kulturo, kiu etendiĝis ĝis Stonehenge en Britujo, originis tie. Vidinda estis interalie ankaŭ Lavaletto, la fortika ĉefurbo konstruita por rezisti la Turkojn kaj aliajn invadantojn. Kaj dum nia tuta tempo tie belegis la vetero.

Nin bone traktis la esperantistoj. Al la flughaveno venis d-ro Carmel Mallia kaj frato Oscar Mifsud, monaĥa oficisto de lernejo en Gzira, kie ni loĝis. Li estis aparte afabla kaj helpema. Unu vesperon en Lavaletto mi konversaciis tre agrable kun ankaŭ d-ro Heinrich Dingeldein,

vizitanto el Marburg, Germanujo.

De tiu insulo ni faris flugekskurson al Sicilio, kie dum ok tagoj ni trajne vizitis Sirakuzon, Taorminon, Mesinon kaj Palermon, revenante al Katanio tra la landinterno. Ankaŭ tie ravis la vetero. Vere imponis precipe la Helenaj restaĵoj en Sirakuzo, la spirkapta beleco de Taormino kaj la Normandaj mozaikoj en Palermo kaj Monreale.

Pri Ruslando mi povus verki tutan ĉapitron, sed jen restas nur parto de letero dupaĝa.

Du homoj de Malto konfesis al mi, ke ili ŝatus iri tien, sed simple timas tion fari. Nu, ĝi estas lando kelkrilate tute diferenca de iu ajn alia kun ni jam vizitis. Ĝenis mia preskaŭ plena nekapablo paroli la Rusan. Krome, mi memoris kion mi legis antaŭe: ke la homoj de tiu lando estas tre fermitaj al fremduloj kaj ke eksterlandanon oni ne akceptas facile; sed por ni tio tute ne veris. Mirindaj ili estis, kaj tro multaj por eĉ mencii ĉiujn.

En Moskvo Garik Kokolija venis al la flughaveno por renkonti nin, kaj pro la ĉeso de busoj post pli frua tempo, atendadis nin ekde la meznokta horo ĝis ĉirkaŭ la kvina! Kiel ni iam povos forgesi tion? Nin afable ĉirkaŭmontris nia invitinto, Andrej Ananjin, la prezidanto de la Rusia Esperantista Unio, kun sia edzino, Jelena. Kaj kiel kara estis la gastiginta Ludmila (Luda) Kulikova, kaj sia pacienca edzo Andrej, kiu nur iom komprenis la Internacian Lingvon!

En la Klubo, kiun ni vizitis kaj kie mi paroladis, mi denove konstatis kiel elstare la Rusoj scipovas la Internacian Lingvon. En Moskvo eĉ ekzistas aparta klubo literatura. Mi prelegis kaj renkontis diversajn verkistojn, inter aliaj Nikolaj Stepanov, esploriston pri la Stalinaj krimoj kontraŭ Esperanto kaj aŭtoron de libro koncerne la vivon de Varankin.

En Sankt-Peterburgo nin gastigis kaj multe ĉirkaŭŝoforis Vladimir (Valoĝa) Bogomjakov. Tre amike akceptis nin tie ankaŭ la Klubo en la vespero antaŭ nia foriro el tiu urbo mirinda.

Por aliaj elpaŝoj, ĉiam tra neĝo, ni havis daŭran akompanantinon, Irina Skladnova. Dum du semajnoj ni neniam estis sen la helpo de homo scipovanta Esperanton. Oni traktis nin kvazaŭ reĝe.

Du fojojn al sia ambasadejo nin invitis lia ekscelenco d-ro György Nanovfszky, la Hungara ambasadoro al Moskvo, bonega parolanto de la Internacia Lingvo. La unua okazo estis por multaj homoj, precipe gravuloj multnaciaj. La dua estis renkonto privata. Krom la ambasadoro mem, ni estis nur tri: nia akompanantino, Jorg De Mulder, juna samideano el Belgio (kiu deziris kuniri) kaj mi. Bedaŭrinde en tiu tago Ria iom malsanis kaj ne povis kunveni. La ambasadoro donacis al ĉiu belan libron pri sia lando.

En Moskvo ni turisme vidis interalie la Kremlon kaj, sur la Ruĝa Placo, la maŭzoleon de Lenin (kun li interne, aspektanta kiel vaksa pupo kiun preterpaŝis la historio); kaj la vintran palacon en Sankt-Peterburgo. Ĉi-lastas estas nun muzeo, sed pli alloga ol la enhavo estas la konstruaĵo mem. Fakte abundas la bela arkitekturo de Sankt-Peterburgo, kie forte postetosas la periodo de Petro la granda, krom la aliaj caroj.

Kompreneble nun la Rusoj reprenis multon el tiu tempo de antaŭ la revolucio, kvankam ne neblas, ke la sovetia periodo lasis multajn spurojn, ne malpleje en la pensmaniero. Kio min vere iritis estis la kutimo ekspluati homojn el aliaj landoj per alternativaj prezoj multe pli altaj, ekzemple se oni volas viziti muzeon aŭ trajne vojaĝi inter urboj. "Sed tio estas justa," argumentis unu homo certe ne rekonstruita, "ĉar vi estas pli riĉaj." Mi respondis: "Vi mem, aŭ almenaŭ viaj regintoj, malriĉigis vin. Certe ne ni. Ĉu vi ĉiukaze konsentos, ke laŭ tiu rezonmaniero oni devus havi apartan prezon por ĉiu individuo, eĉ Ruslanda? Ĉar varias la enspezoj ankaŭ ĉe viaj homoj."

Fakte, Rusoj ankoraŭ ne komprenas la mekanismon de la libera merkato. Ili pleje preferus, ankaŭ la eldonistoj Esperantaj, vendi malmulte por alta prezo; anstataŭ multe por prezo pli favora el la vidpunkto de la aĉetantoj. Ŝarke kaj kolerige ekspluatemaj estas precipe la taksiistoj ĉe la flughaveno.

Turistojn oni efektive ne deziras, ĉar ne eblas viziti tiun landon sen invitilo, prefere de organizo kaj ne simpla individuo. Kaj la vizo aparta mencias la urbojn al kiuj la koncernulo limigu sin. Alia, pli normala, sistemo - kaj samprezigado - alportus multegon da turistoj, kaj grandajn enspezojn por multaj Rusoj. Tiurilate la lando havas vastan potencialon.

La melankolia fakto tamen estas, ke Stalin kaj aliaj de lia tribo ege klopodis krei novan specon de Socialisma homo. Ili sukcesis rimarkinde. Pro tio mi dubas, ĉu povos malaperi rapide la granda malriĉeco de Ruslando. Aliflanke ne veras, ke ĉiuj ĝiaj konstruaĵoj estas malpuraj aŭ mizeraspektaj, kiel mensoge kredigis iuj ĵurnalistoj de la Okcidento. Kun malica sistemo ili fotis nur la slumojn de la landoj foje socialismaj.

La ĵurnalistoj serĉadas sensacion multe pli ol la veron. Same okazis rilate al Sud-Afriko, kiel mi denove vidis televide antaŭ kelkaj tagoj, kiam oni montris la nigrulajn loĝlokojn de Soweto. Oni prezentis ekskluzive nur dometaĉojn. Sed mi jam estis en tiu urbego, kaj en pluraj aliaj urboj de miaj nigraj samlandanoj. Mi ankaŭ vizitis amikojn tie.

Niaj nigruloj posedas multegon da domoj fortikaj, puraj kaj bonaj, ne malofte eĉ luksaj - ĉi lastaj kun du banĉambroj k.t.p. Sed ĉu nur tre escepte? Tute ne. El la nigruloj de mia lando centoj da miloj loĝas en domoj pli bonaj ol multaj homoj en Londono aŭ Amsterdamo. La ĵurnaloj kaj la televido neniam raportas pri tio, kaj aliaj pruvoĵoj de bonstato (ekzemple

multego da aŭtomobiloj), ĉe sufiĉe granda parto de la Sudafrika nigrularo - kaj mensogas per sia silento. Ekvilibran veron tiom da ĵurnalistoj tamen pleje ne deziras aŭ deziris, ankaŭ ne pri la Rusoj.

Kvankam ĉi tiu nun ĝenerale malriĉas, kulture ili ne estas sub la nivelo de aliaj landoj. Tute kontraŭe. Ruslando iam faros, denove, grandajn kontribuojn spiritajn krom intelektaj al al cetera mondo.

La Rusaj virinoj ŝatas belajn vestojn. Por ili, kiuj ofte devas porti tiom da vivoŝarĝoj, mi havas grandan admiron.

En Moskvo ni tre ĝuis la dancadon de gebaledistoj mondfamaj, ne en la Granda Teatro (kiu estas astronomie multekosta), sed en la Kremlo palaco, halego luksa. Unu belan vesperon en Sankt-Peterburgo ni krome frandis koncerton de ĉambromuziko.

Kiel Adventistoj de la Sepa Tago, mi kaj Ria vizitis niajn centrajn preĝejojn en kaj Moskvo kaj Sankt-Peterburgo. Malriĉas la homoj, sed kiel bele kantis la ĥoroj!

Ni foriris el tiu lando kun ses kompaktoj da kantado. Fremda ĝi iufoje estas al niaj oreloj, sed bela, kiel la alfabeto cirila. Antaŭ ĉio ni kunprotis mirindan bukedon da memoroj.

Stranga, krom laciga, estis la flugo el Moskvo al San Francisko. Unue ni sagis trans Spitsbergenon, ĝis proksime al la poluso, kaj tiam suden en Alaskon. Neniam ni tute postlasis la lumon, irante je 850 km en la horo pasintecen, laŭ la horloĝo, kvankam ni fakte tute perdiĝis en la tempo. Sube disruliĝis tapiŝego blanka, ornamita de montoj, gleĉeroj kaj glacifendoj. Mi diris al Ria, ke tiun mondon kreis ĉefe iluzio kaj la malvarmo, ĉar sub ni ekzistas efektive nur akvo, krom iuj insuloj. Cetere ni flugis proksimume laŭ la foje planita raŭto de la interkontinentaj raketoj, portuntaj la morton al Nord-Ameriko, kaj la mondo. Ni eksciis kiel fremdas nia terглоbo. Ĝis en San Francisko tio daŭris ĉirkaŭ 15 horojn.

Kaj fine ni troviĝas ĉe nia filo, André, kaj lia familio (ili nun havas du filojn kaj novan filinon). Vizitas el Sud-Afriko ankaŭ Carl, nia alia filo. Dum kelkaj semajnoj dormos sub unu tegmento kaj mi kun Ria kaj ĉiuj niaj posteuloj.

BAHASA INDONESIA

La sekvontan artikolon sendis al ni s-ro Edwin Burg el Nederlando. La artikolo aperis nederlandlingve en kelkaj gazetoj en tio lando. S-ro Burg poste angligis ĝin kaj nun proponas, ke ni inform- kaj propagandcele utiligu ĝin. Se iu leganto volas aperigi ĝin en loka gazeto, bv. sendi ĉu la koncernan numeron, ĉu fotokopion al s-ro Burg, Roelofs strato 91, NL-2596 VL Hago, Nederlando.

Few know that the Indonesian language is a scientifically developed, artificial language, just like "Ivrit", the modern Hebrew spoken in Israel and "Nynorsk", the second language of Norway.

For decades this planned language "Bahasa Indonesia" has proved its value and practicality in that large island chain where approximately 400 (!) different languages are spoken. A territory which covers an area from London to Sverdlovsk, behind the Russian Ural Mountains, and from Sweden to halfway down to the Mediterranean.

Indonesia's language is strongly related to Malay which is spoken on the Malayan Peninsula of Malacca and on smaller surrounding islands such as the Riau Archipelago situated between Singapore and Sumatra. For many centuries the seafaring inhabitants of the Riau Archipelago have conducted business along the long and seemingly endless coastline of the former Dutch East Indies, now the Republic of Indonesia. Based on reliable information their version of Malay, "Bahasa Malayu", became - probably in its simplified form - the "Lingua Franca" in this part of South-East Asia. First along the coast and later into the deep interior of the larger islands, where diversified segments of the population congregated at commercial centres ("Pasars"). Here this simplified and easy to learn language called "Bahasa Malayu Pasar" gained popularity.

Born and brought up in East Java I spoke Dutch at home, but I also had to make myself understood in "Bahasa Malayu Pasar", "Bahasa Madura" (spoken on the nearby island of Madura), and had to familiarize myself with at least two languages spoken by the Javanese population in Central and Eastern Java. The Javanese culture has a high moral standing, and the Javanese people can express themselves in at least three to four languages. In their culture an individual of lesser ranking will address his superior in "High Javanese", while the higher in rank will speak to his subordinate in "Low Javanese". "High Javanese" and "Low Javanese" are as different as the Dutch to the French language. Courtiers in the

Kingdoms of Yogyakarta and Surakarta additionally spoke a "Court Javanese" and according to experts, there is still another language known as "Literary Javanese". Imagine all these different languages being spoken by the people of one nation!

In order to improve communication with the people of this widespread archipelago and their different idioms, and to enhance the contacts between the diversified ethnic groups, the Dutch Government in The Hague, together with the Colonial Civil Service in the Dutch East Indies, expressed the need to come up with a valid "Lingua Franca". Such a "Lingua Franca" would not only be useful, but above all necessary to govern this large conglomerate of islands with a population so different in ethnic and cultural backgrounds.

In 1908 the language expert, C.A. van Ophuijsen, son of a civil servant in Bukit Tinggi (ex Fort-de-Kock) on the island of Sumatra, published the first "Bahasa Malayu Pasar" grammar book. His monumental effort was labeled "Bahasa Malayu van Ophuijsen".

In the years between 1925 and 1930 an independent commission perfected van Ophuijsen's language project even more. It is quite surprising to note that on October 28, 1928, during the colonial years, the indigenous forerunners of the independence movement issued a proclamation "Indonesia - one country - one language, Bahasa Indonesia". Soon after World War II this intermediate language became rather popular and in 1948 it became the official language of this newly born country.

After Indonesia's independence in 1949 this basically artificial language matured rapidly. In 1940 only 6% of the population spoke the official language, by 1960 this number had increased to 60% and generally spoken it is now used all over this large archipelago.

Still there is something we have to know. "Bahasa Indonesia", literally translated, means "Indonesian Language", so don't say "Do you speak 'Bahasa'?", because you are saying "Do you speak 'Language'?"!

"Bahasa Indonesia", a successful story of a planned language!

Let us hope that the leaders of the European Community will also develop a vision similar to the one developed by those who worked so diligently for the independence of Indonesia. And that they **-in order to protect and preserve the language of each member's country -** will strive for the introduction of this relatively easy-to-learn, politically neutral, supernational communication tool: **the International Language Esperanto.**

Deziras korespondi ...

Ĉeĥio

S-ro Dvoraň Ladislav volas korespondi kun personoj en Hindujo, Grekujo, Anglujo, Japanujo kaj Usono pri diversaj temoj. (*Ĉu oni legas B.E.-on en tiuj landoj? - red.*) Lia adreso estas:

39102 Sezimovo Usti
Khanjence 675/A
Distr. Tábor
Ĉeĥa Respubliko

Deziras korespondi kun iu en Sudafriko:

f-ino H. Skeriková
Stitného 20
39470 Kamenice nad Lipou
Ĉeĥio

Togolando

S-ro Gbeglo Koffi, ĝenerala sekretario de la landa E-o asocio de Togolo, ŝatus korespondi kun sudafrikaj esperantistoj. Li ŝatas verki kaj "observi la vivon". Li ankaŭ tre interesiĝas pri instruado de Esperanto, ĉar li gvidas instituton, kiu organizas E-o ekzamenojn. Lia adreso:

B.P. 13169
Lomé
TOGO

F-ino Patrice Kossivi Assiobo, studentino de ekonomio kaj kontado ĉe la nacia universitato de Togolo, volas korespondi. Ŝi ŝatas legadon, vojaĝon, sporton, komercadon kaj muzikon. Skribu al:

B.P. 60614
Lomé
TOGO

Pollando

S-ro Wieslaw Michalak, 43-jara instruisto, volas ligi korespondadon kaj tiel amikiĝi por poste partopreni komune someran libertempon kaj praktiki la lingvon. Se interesiĝas instruisto, eble oni povus ligi kunlaboradon inter la lernejoj. Lia adreso:

p/a Zasadnicza Szkola
Zawodowa Specjalna
Al. Spoldzielczosci Pracy 65
20-47 Lublin
POLLANDO

Usono

Mrs Kerry C. Collins (31), lernantino, ŝatus korespondi. Ŝia adreso estas:

2530 South Main Street
Number 28
Rockford, Illinois
61102
USA

Tanzanio

S-ro Sylivester N. Nyinyimbe, 36-jara elektronika teknikisto kaj aktiva esperantisto ŝatus amikiĝi kun Sudafrikan(in)o(j). Liaj interesoj estas aŭskultado de muziko, studado, amikeco, ĝardenado, korespondado kaj ideo interŝanĝo. La adreso estas:

P.O.Box 147
Bunda
Tanzania